



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 6-a de Decembro 2021

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Mikaelo Lineckij (zome), Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel, Eran Yuval-Vodevoz, Gabi Zeevi (zome).

Protokolo de la pasinta (novembra) kunsido estis sendita al la estraranoj kaj enretigota.

1. Raportoj

- a) **Jehoŝua**: iu ĵurnalisto demandis min pri la malbona stato de Zamenhof-strato en Hajfa.
- b) **Jehoŝua**: dum la mendo pri decembraj kunvenoj evidentiĝis, ke WIZO ne postulis (nek ricevis) la monatajn pagojn. Ŝlomo ordigos.
- c) **Amri**: la laŭvica "Nicocot"-programo finiĝis sukcese kun 24 gelernantoj el la 10-a klaso; kelkaj eĉ intencas veni al la ZV. Ankaŭ Tali Wandel havis sian grupon antaŭ 3 semajnoj.
- ĉ) **Ŝlomo** (je demando de **Eran**): la luantoj de la Dratverejo pagas 3,200 NIS monate, el kiuj 5% iras al la ten-kompanio de Lior Hass (7% post la unua jaro).

2. La Zamenhofa Vespero (Jehoŝua)

Ĝi okazos mardon, la 14-an de Decembro, inter la 17h00-21h00. En la arta parto partoprenos Mikaelo kaj Inbar (ĉu Enrica?) kaj prelegos Amri E-e kaj Amir Naor hebree (zome). En la Ĝenerala Kunveno Jehoŝua prezentos la jarraporton, Amri informos pri la venonta IK kaj Ŝlomo voĉdonigos pri financaĵoj (aparte la buĝetpropono). Krome oni elektos la novan Estraron por du jaroj, reaprobos la kontiston kaj la Kontrol-Komisionon aprobinte ties Raporton kaj Laborplanon pri 2022. Jehoŝua petos ĉe WIZO prepari ĉion en la granda salono. La tuton prezidi akceptis Judith Epstein.

3. Financoj (Ŝlomo)

Ni devas daŭre serĉi magazenon por nia libraro.

4. Israela Esperantisto (Amri)

Mikaelo sendos ĝin, sed bezonas unu tagon por lasta trarigardo. **Amri** devos printigi novajn kovertojn, ĉar ili elĉerpiĝis, laŭ la etikedoj far **Jehoŝua**. **Amri** enkovertigos kaj enpoŝtigos.

5. Oficejo

- a) Ni donu sekurĉekon al la administranto de la 4-a etaĝo – *unuanime aprobata!*
- b) La antaŭa luanto, adv. Ĥagit eble volos relui ekde Januaro. La peranto parolu kun ŝi.

6. La 22-a Israela Kongreso

Amri konfirmis kaj subskribis la kontrakton kun la gastejo *Ruth Daniel* en Jafo.

La venonta kunsido: la 10-an de Januaro 2022

Protokolis: Gabi Zeevi